**N I A V O Ĉ O**

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **JULIO-AŬGUSTO 1999**

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:
http://www.ciudadfutura.com/esperanto

**ESPERANTO EN INTERRETO**

La malaga kantisto "Solo" havas hejmpaĝo: www.ciudadfutura.com/esperanto. Ĝi enhavas pecojn de lia nova albumo "PoLimoRFia ArkiteKnia" kaj la tekstoj de la kanzono kaj vortoj de la aŭtoro

**ESPERANTO-SIDEJO EN ZARAGOZA**

Fundación Esperanto kaj Societo Frateco informas la esperantan komunumon ke ekde la 1-a de majo ambaŭ organizoj havas komunan oficialan sidejon en: Cadena 20-22, 1 izq. ES-50001 Zaragoza. La sidejon, kiu situas en la centro de la urbo, akiris ambaŭ asocioj danke al malavaraj donacoj de kelkaj geesperantistoj.

**ESPERANTISTO PREZIDAS KATALUNAN ASOCION DE VERKISTOJ**

Fama verkisto en Esperanto kaj aliaj lingvoj, Manuel de Seabra, estis elektita la 14an Majo pasintan kiel prezidanto de ACEC, Profesia Asocio de Verkistoj de Katalunio, al kiu apartenas 300 aŭtoroj verkantaj ne nur en kataluna aŭ kastila, sed ankaŭ en iu ajn lingvo. Fakte, eĉ membras germanoj, poloj kaj ĉinoj! Bonega cirkonstanco por ke intelektuloj havu fidindan informadon pri nia lingvo!

**HISPANIO**

En **Tarragona** , Joan Marimon organizis kurson en Hospitalo. 14 homoj aliĝis, el kiuj restas 12. La plimulto estas universitatanoj.

César de Mosteryrín, en **Segovio,** finis sukcese du kursojn de esperanto. 5 gelernantoj partoprenis en koresponda kurso kaj aliaj kvin sekvis en lernejo la metodon "Jen nia mondo".

**BABELA FABELO**

Pere de Lupe Sanz la "Maratón de Cuentos de Guadalajara" ricevis la fabelon "Nuntempa Noao" en 18 lingvoj: angla, germana, astura, bulgara, kataluna, korea, ĉeĥa, hispana, esperanta, hebrea, itala, japana, latina, rusa, ukrania, eŭska, galega kaj valencia. " (en aparta folio ni inkludas la tekston en esperanto kaj hispana). La partopreno en tiu evento kiu daŭris pli ol du tagojn sen paŭzo estis granda propagandilo por esperanto.

**RADIO EN MALAGO**

Ekde junio komencigis radio-programo en/pri esperanto en "Radio Mar" (FM 102,4) de la malaga vilaĝo Arroyo de la Miel. Ĝi okaziĝas la unuan merkredon de ĉio monato, pere de tiu programo Andaluzia Esperanto-Unuiĝo volas en nur informi pri esperanto, sed ankaŭ disponigi al internaciaj turistoj kaj loĝantoj de la internaciema Suna Marbordo, programon en la internacia lingvo.

# ¡¡¡¡¡FELIĈAN SOMERON !!!!!

| NIA VOĈO | JULIO 1999 |
|---|---|

**HEF ANGULO**

Lunde kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson 91 446 80 79. Ankaŭ e-poŝto: admin@esperanto-es.org

TTT-PAĜO: Hispanaj E-asocioj kaj grupoj kiuj deziras aperigi iun ajn mallongan komunikon en la sekcio novaĵoj de la reta paĝo de HEF (maksimume 255 signoj), bonvolu retskribi al DARIOROD@teleline.es

Fundación Esperanto havas novan ret-adreson <fundacion@esperanto.nu>

Okazis Eksterordinara Ĝenerala kunsido de HEF, la 29an de Majo, por aprobo de la dokumentoj prezentendaj al "Ministerio del Interior" (kontoj).

**ESPERANTO EN AMAS-MEDIOJ**

En la ĵurnalo "The Boston Globe" (990512) aperis interesa artikolo pri esperanto.

Onda IMEFE (FM 107.2) (radio de la Madrida Kounumo)intervjuis al Jorge Camacho en rekta elsendo.

Fernando Moral, J. Camacho kaj usona esperantisto partoprenis en TV-programo de Tele Cuatro Caminos en Madrido

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

En la Hispana Kongreso de Esperanto (Castellón 17-21-a de julio), la programo estas tre bunta, plena je artaj kaj kulturaj aranĝoj, kompreneble ĉiuj en Esperanto. La tre konata kaj prestiĝa

Bulgara Esperanto-Teatro (BET) prezentos tri teatraĵojn. Jam estas konfirmita la kuirado de giganta "Paella" por 500 homoj, por la kongresanaro, kompreneble senpage. Ĝi okazos liberaere, dimanĉe la 18-an, ĉe la plaĝo.

84-a UK Berlino (Germanio). 31-a de julio ĝis 7-a de aŭgusto 1999.

**VENAS SOMERO**

Aĉetu ĉe MEL T-ĉemizojn kun verda stelo ĉirkaŭita de la vorto ESPERANTO.

Prezo: 600 PTA plus sendokosto

20% rabato por pli ol 20.

:::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
**San Alejandro 6-4ºB. Ext**
**28005 Madrid**
Asociación de Utilidad Pública Municipal

# NUNTEMPA NOAO

*"A Modern Noah", traducido al esperanto por Ana Manero*
*Federación Española de Esperanto*
*Rodríguez San Pedro 13-3º. 28015 Madrid*
*Tel. 91 446 80 79*
*admin@esperanto-es.org*

Kaj Dio alparolis Noaon kaj diris:

-Post ses monatojn mi pluvigos ĝis la tuta terglobo estu kovrita de akvo kaj ĉiuj malbonuloj detruitaj. Sed mi volas savi kelkajn bonulojn kaj paron el ĉiu besto-speco sur la planedo. Mi ordonas al vi konstrui arkeon. Kaj per fulmo Ĝi liveris al li la specifojn por la arkeo.

-Bone, -diris Noao timo-treme, fuŝmanipulante la skiz-projekton.

-Ses monatoj, tiam ekpluvos -tondris Dio. -Pli bone vi havu mian arkeon preta, aŭ lernu kiel dum longe naĝi.

Pasis ses monatoj. Ĉielo eknubiĝis kaj pluvo ekfalis. Dio vidis Noaon sidanta ĉe sia ĝardeno kaj ploranta. Sed ne estis arkeo. -Noao! -vokis Dio, -kie estas mia arkeo?

Fulmo-tondro krakegis kontraŭgrunden proksime de Noao. -Mia Dio, bonvolu pardoni min -petegis Noao. -Mi faris mian eblon, sed estis grandaj problemoj. Unue, mi devis atingi konstrupermeson por la arkeo-projekto, sed viaj planoj ne plenumis la normojn. Tial mi devis dungi inĝenieron kiu redesegnu ilin. Poste mi troviĝis en granda diskuto, ĉu la arkeo bezonas ŝpruc-sistemon krontraŭ fajro aŭ ne.

Miaj najbaroj plendis ke mi malobeas la regulojn pri urboplanado konstruante arkeon en mia ĝardeno, tial mi ricevis malkonsenton el la Urboplana Komitato. Post tio estis granda problemo akiri sufiĉan lignon por la arkeo. Celante savi la punktitan strigon, oni malpermesis haki arbojn. Mi devis konvinki la "Fiŝan kaj Sovaĝan Vivon" pri tio ke mi bezonas la arbojn ĝuste por savi la strigojn. Tamen ili permesos al mi preni eĉ ne unu strigon. Nu, ne estos strigoj.

La ĉarpentistoj, poste, unuiĝis kaj strikis. Mi devis alveni al interkonsento kun la Nacia Komitato pri Laborrilatoj antaŭ ol iu ajn prenu segilon aŭ martelon. Nun ni havas 16 ĉarpentistojn laborantaj ĉe la ŝipo, sed ankoraŭ ne strigojn.

Ekkolektinte la bestojn, mi estis denoncita de la Grupo por Bestaj Rajtoj. Ili protestis ĉar mi prenis nur unu paron el ĉiu speco. Ĝuste kiam finiĝis ĉi proceso, la Medi-Protekta Agentejo imformis min ke mi ne povos fini la arkeon sen antaŭe plenumi deklaron pri la impakto de via proponita inundo ĉe la medio.

Ne bone ili akceptis la ideon ne havi jurisdikcion rilate la konduton de Supera Estaĵo.

Pli poste la Inĝeniera Korpuso volis mapon pri la novproponita inundo-plano. Mi sendis al ili globuson. Ĝuste nun, mi klopodadas solvi plendon el Komitato por Egalaj Labor-Ŝancoj, pri kiom da kroatoj mi havas la intencon dungi. La Departemento Pri Tributoj konfiskis ĉiujn miajn hava?ojn pretekstante ke mi intencas eviti la pagon de miaj impostoj per forlaso de la lando, kaj mi ?us ricevis atenton el la Ŝtato ke mi ankoraŭ ŝuldas ian kutiman imposton.

Vere, mi ne kredas ke mi povos fini vian arkeon antaŭ ol kvin jaroj estos pasintaj -lamentis Noao.

Ĉielo ekheliĝis. Suno ekbrilis. Ĉielarko akaperis. Noao rigardis supren kaj ridetis. -Ĉu tio sifnifas ke vi ne detruos la teron? -demandis Noao esperoplene.

-Ne -diris Dio malgaje, -la registaro venkas Min je tio.

